

R. TOBELLÀ

Eldonisto de CLAU ESPERANTO kaj FDSVORTARETO

18, Carme, 18 - Barcelona
ESPERANTA PRESEJO

TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas nur en esperanta lingvo; literaturo, kalendaro kaj eksterlanda novaĵo, rakontoj, unuigo, por instrua praktiko k. t. p.

PREK: ANONCO / Ekster Hispanio. 4 frankoj (1'60 Sm.)
(En Hispanio) 3 (1'20 . . .)
UNA NUMERO 40 centoj (1'00 Sm.)
Porta abonantoj kaj butik-romoj: 25 (0'75 . . .)

Specimeno (nomenita numero) estas ricevebla po sia valoro.

Ĉiuj mendoj devas esti akompanitaj de mono.

Ĉiuj manuskriptoj estu frotitaj per germana, franca, aŭ hispana pastmarkoj; per franca aŭ hispana respondo: per internaciaj respondokuponoj de 10. snt. kaj per dekoj aŭ dekspagitoj de la Ĉekbanko Esperantista.

Oni bonvolu skribi legeble sur respondo, postkarto, aŭ aldoni respondokuponon. La leteroj, se oni postulas respondojn, en nova abonanto ricevas senpage la eksterordinaran numeron de la V. Kongreso, samtempe ke tiu havas la rajton skribi la kolektojn de la jaroj 1908, 1909 kaj 1910 por la duono de sia valoro, t. e. po 1'50 fr. 0'60 cent. kaj, kiel la ceteraj abonantoj, povos mendi, por unu fojo dum la tuta jaro, trillitajn anoncojn.

ABONANTOJ

Francujo: Libro de Esperanto Versailles
Katalunujo:

- S-ro J. Suñer kaj K.º, Presejo - S. Felu - Guitxols.
- S-ro Rosals - Portaferrisa, 31, Barcelono.
- S-ro J. Palmerola, P. Major - Vic.
- S-ro J. Quintana, Cases Noves - Palafregell.

Ĉiu abonanto aŭ esperantisto kiu deziru sin anonci, bonvolu sin turni al S-ro. Administranto.

Anoncoj por jeli korespondadon kostas 10 centoj (1 snt.) ĉiu linio

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO
Tallers, 61 - Barcelono

Per administraciaj afaroj sin turni al S-ro B. Anglada

KATALUNA KATOLIKO

Organo de la Kataluna ligo de katolikaj esperantistoj

Redakcio kaj Administracio:

Ce librejo ROSALS
Puertaferrisa, 30 - BARCELONO
(HISPANUJO)

★ ★ Esperanta ★ ★ Biblioteko Internacia

Tiu-ĉi biblioteko enhavas facilajn legilojn de ĉiujlandaj eminentaj esperantistoj. Ĝi estas bonego tufigas per ekzercado de la lingvo en ĉiujn lagrupoj kunvenoj en privata tereno.

Prezo po kajero 0,10 Sm (0,20 Bl.)
Serio de 12 volumoj (arankite) 1,25 Sm (2,50 Bl.)
Ĉiu libreto enhavas 40 - 50 paĝojn.

Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin S. W. Linden-Strasse 18 - 19.
Por Hispanujo: Joan Rosals, Barcelono, strato Portaferrisa, 30

Bazar Esperantista



Specialo en la mezuro de ĉemizo por viroj. Konfekcioj por sinjorinoj kaj geinfanoj, kravatoj, poŝtukoj, gantoj, parfumoj, trikotoj kaj aliaj artikoloj.

Tratador, 2-3nagueros, 18 BARCELONO

TUTMONDA ESPERO



Barcelona, Decembro 1911

40 cent.

MISTERA KRIMO

Amuza unuakta komedieto. . . 1 fr. (0'400 sm.)

Mendeblaj ĉe MIKHELO CASES, Strato Salmerón, 229, 4.º - Barcelona (Espana)

Unu fojon...!

Humorajaro taŭga por la Esperanta lernado. 0,30 fr. (0'120 sm.)

LUEBLA

ESTAS MALFERMITA POR LA JARO 1912
ABONO AL LA GAZETO

“LA ONDO DE ESPERANTO”

(Lau la adreso: MOSKVO, Rusujo, Tverskaja, 26).

Dum la IV-a jaro de sia regula funkciado „LA ONDO“ senpage donos al siaj abonantoj, krom 12 n-roj (16—20 paĝaj) la speciale por tiu celo tradukitan de sino M. Sidlovskaja ĉefverkon de rusa literaturo:

„Princo Serebrjanij“ de TOLSTOJ

(352-paĝa, grandformata libreto, kies prezo por la neabonantoj estos afrankite Sm. 1,60)

Literat, konkursoj kun monpremioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Beletristiko origin. k. traduk. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako. Korespondo tutmonda (poŝk. ilustr).

La abonpagon (2 rubl.=2,120 Sm.) oni sendu al „Librejo Esperanto“ (26, Tverskaja, Moskvo, Rusujo) aŭ al aliaj Esper. librejoj. poŝtmandate, respondekupone, pa-permone aŭ per bankĉekoj.

TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

4^a Jaro

Barcelono, Decembro 1911^a

N-ro 46

ENHAVO: Gratuloj. — La kokino. — La vojo. — La magia ĉemizoj. — Viaj okuloj. — La kanto de l'barbaro. — Ĉarmoj de la muziko. — Amuzajo. — Pensoj. — Diversaj sciigoj. — Bibliografio. — Al niaj abonantoj. — Anoncoj.

En la 5^a datreveno de la naskiĝo de nia kara majstro D-ro Zamenhof, TUTMONDA ESPERO sendas al li niajn plej korajn salutojn.

Jam finita la kvara jaro de nia apero, la Redakcio de TUTMONDA ESPERO, havas la honoron sendi je la nomo de la esperantistoj de la malnova Societo «Espero Kataluna», la plej korajn bondezirojn al la universala esperantista gazetaro, kaj al ĉiuj samideanoj enlandaj kaj eksterlandaj, dezirante samtempe feliĉan finon de la nuna jaro kaj komencon de la venonta.

LA REDAKCIO

LA KOKINO

I

En la ĉirkaŭaĵoj de la Fontainebleau'a arbaro kaj en izolita kruto, loĝadis Johano Klaŭdio Duran, malriĉa viro kiu ekzercis ĉiajn metiojn, sciante defenitive nek unu el ili.

La malfeliĉulo suferegis por nutri sian malsanan edzinon kaj ankaŭ siajn tri fiĵojn unu el ili ankoraŭ, mamsuĉanta.

Ofte li estis ne laborante kaj neniam la mizero forlasis sian hejmon.

Unu el la tagoj je kiu Johano Klaŭdio trovis uenian okupon kaj en kiu la familio ne estis manĝinta, li ekbatis la tablon per forta pugna bato dirante al sia edzino:

—Tio ĉi ne povas daŭrigi, Magdaleno! Tio ĉi ne estas justa! Mi ĵus faros barbaraĵon!

La edzino penis por trankviligi lin.

—Pensu pri niaj filetoj—ĉi ekkriis.

—Ĉar mi pensas pri ili, mi estas preta finiĝi tion je unu foje. Hodiaŭ mem mi bezonas monon. Ĵus mi ekpensis ideon.

Ni iros en Parizon por serĉi riĉecon.

—Ci timigas min—respondis Magdaleno.

—Serĉu okupon.

—Nenien mi trovas ĝin.

Johano Klaŭdio eliris el sia loĝejo kaj vidis apud muro tuberkulozan kokinion, kiu vane serĉis grenojn en la sablo.

Ĝi estis la sola kiu restis al ili.

Li kaptis ĝin kaj reeniris sian hejmon.

—Mi ne sciis ke ankoraŭ restis al ni tiun kokinion—li diris.

Ĝi estas la lasta, sed estas ĝi tiel malgrasa ke mi ne kuraĝis ĝin mortigi.

—Mi iras vendi ĝin.

—Neniom donos al vi pro ĝi. Ĉu vi ne vidas ke ĝi nur havas la ostojn kaj la haŭton?

—Mi ja vidas tion!—Aldonis Johano Klaŭdio, sin armante per dikega bastono.

—Ci timigas min!

—Lasu al mi pace virino.

—Zorgu ne agi malbone! ekkriis la edzino.

—Mi nepre bezonas monon.

Johano Klaŭdio forlasis sian hejmon, kunportante en maldekstra mano la kokinion kaj en la dekstra la dikian bastonon kaj interniĝis en la arbaron serĉante iun kiu estus perdinta lian vojon.

Li mem ne sciis certe kion faris.

II

La bankiero Van Gorde estis irinta kune kun aliaj amikoj por viziti la arbaron de Fontainebleau.

Kunportante fotografan aparaton, la bankiero interniĝis sola, en vojeto por serĉi fotografiindan lokon.

Marŝis distrita la inda sinjoro, kiam subite renkontiĝis kun Johano Klaŭdio.

La bankiero perdis la serenecon. Liaj amikoj estis malproksime kaj li ne povis atendi akuratan helpon.

Johano Klaŭdio levigis sian dikegan bastonon.

—Kion vi intencas fari?—balbutis Van Gorde.

—Vendi al vi tiun ĉi kokinion.

Nu, kian monkvanton mi devas elspezi por aĉeti ĝin al vi?

—La kvanton kiun mi bezonas. Mi havas edzinon kaj tri filojn kiuj ek-mortiĝas pro malsato. Aĉetu al mi la kokinion, kontraŭe mi mortigos vin.

La bankiero malantaŭeniris kelkajn paŝojn.

—Se vi alvokas iun tuj vi estos inter la mortintoj.

—Nu, kiom da mono vi volas?

—Du mil frankojn. Tiu ĉi kvanto estas nenio por vi, kaj por mi estas riĉeco.

La bankiero donis al Johano Klaŭdio la postulitan kvanton.

La malbonfaranto ĵetis la kokinion sur la piedoj de Van Gorde kaj foriris kurante.

Li revenis al Fontainebleau, ŝanĝis 100 frankan bileton en trinkejo, aĉetis nutraĵojn kaj reiris al sia hejmo.

—Jen sufiĉega manĝaĵo—li diris surmetante la nutraĵojn sur la tablon.

—Satiĝu ĝis elkrevo.

—Kiu donis al vi tion?—demandis al li Magdaleno.

—Ne demandu al mi ion pri tio.

La infanoj sin ĵetis sur la nutraĵoj.

—Kie vi trovis tiun monon?—demandis al li denove la edzino.

—Mi vendis tiun kokinion. Ne demandu al mi plu. Arangu viajn vestaĵojn ĉar tiu ĉi nokte ni translokiĝos al Parizo.

III

La sekvantan tagon Johano Klaŭdio loĝis kune kun sia familio, en modesta dometo de l'kvartalo de Sant-Ouen kaj sin dediĉis je la ĉifona metio.

Unue li gajnis tri frankojn ĉiu tage kaj poste lia laboro produktis al li pokvin. Baldaŭ li akiris puŝveturilon kaj per helpo de sia pliaĝa filo, aĉetis ĉifonojn, en ĉiaj la domoj de la kvartalo.

La afero marŝis bone. Ne malfruis Johano Klaŭdio por vastigi la negocon.

Li luis interetaĝon kaj magazenon kaj baldaŭ estis devigata kontrakti laboristojn por la aĉetado de cifonoj.

Poste li entreprenis la negocon pogrande; havis makleristojn, veturilojn kaj lia firma ja estis unu el la ĉefaj el Parizo.

Zorge enmetis la gajnitan monon en banko, kaj ĉio antaŭ li prosperis.

Li estis riĉa. Tiuj 2,000 francoj de l'bankiero estis fruktodonintaj.

Johano Klaŭdio nur deziris jenon: renkonti sian kontraŭvolan bonfaranton por redoni al li lian monon.

Sed ne sciante lian loĝejon, li malkonfidis atingi sian celon.

IV

Van Gorde, post la atako farita al li, pensis dueli kontraŭ tiu malbonfaranto. Sed poste li konsideris ke tiu homo faris tion pro la mizero. Li diris pri tiu okazintaĵo, nek unu vorton kaj neniam plu li rememoris pri tiu afero.

Dum dekkvin jaroj la banquiero suferis kelkajn malprosperojn kaj tial li estis en nebona situacio.

Ian vesperon iris Jokano Klaŭdio ĉe la bankiero por enspezi la valoron de kambia kvitanco.

Van Gorde sidis en sia oficejo.

—Eble mi eraras—li diris al si men sed ŝajnas al mi ke tiu vizaĝo ne estas al mi tute nekonata.

Li zorge rememoris, kaj frapis sian frunton dirante:

—Tiu ĉi homo estas tiu de la kokino!

Li informiĝis je kiu estis la alvenanto sed sciinte la feliĉan situacion de Johano Klaŭdio, li kredis esti erarinta.

Tamen, ĉar unu el siaj oficistoj donis al li kelkajn detalojn pri la komencaj de la komercisto, Van Gorde petis informojn; kiuj certigis al li siajn suspektojn. S-ro. Johano Klaŭdio Duran estis antaŭe loĝinta en Fontainebleau.

Johano Klaŭdio reiris en la banka firmo Van Gorde fine rekonis lin sed li pri tio nenion diris. Li elpensis projekton tute originalan.

Serĉante pretekston la bankiero iris preparoli al la komercisto, kiu lin akceptis en lia oficejo.

—Sinjoro—diris la bankiero al komercisto,— mi venis tien ĉi por vendi al vi kokinon.

Johano Klaŭdio kredis esti parolante kun frenezulo.

—Mi min ne okupas pri tiuj ĉi aferoj—respondis.—Iru paroli al mia kuiristino.

Van Gorde eliris el unu buŝtuko, kokinon kaj revolveron.

—Mi volas vendi al vi la kokinon. Mi aĉetis al vi unu po 2,000 frankoj antaŭ dek kvin jaroj.

Vi estas mia bonfaranto!—Ekkriis Johano Klaŭdio.—Kia ĝojo renkonti vin! Ne nur 2,000 frankojn mi donos al vi pro la kokino, sed 20,000, kune kun ĝiaj procentoj!... Mi restas tute je via dispono.

Johano Klaŭdio rakontadis sian vivadon, sian pasintan mizeron kaj senesperon kaj petis fine li pardonon al bankiero.

Van Gorde, profunde kortuŝita premis lian manon.

—Se mi ne estus en ne feliĉa situacio, mi ne estus alveninta por ĝeni vin—diris Van Gorde.

Johano Klaŭdio sciigis pri la aferoj de la bankiero kaj helpis lin per sia kapitalo.

Tiuj du sinjoroj estis la plej bonaj amikoj el la mondo kaj post monato la pliĝa filo de l'ĉifonisto edziĝis kun la bela filino de l'bankiero Van Gorde.

Tradukis, P. AGUILÓ.

EUGENIO FOURRIER.

LA VOJO

Ni publikigas la originalan poezion de D-ro Zamenhof; kaj la lertegan tradukon de la emblema samideano Pastro J. Muixí kiu bedaŭrinde, mortis antaŭ kelkaj monatoj.

LA VOJO


Tra densa mallumo briletas la celo
al kiu kurage ni iras,
simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.
—Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj
nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj,
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas la voj' elektita.
—Nur rekte, kurage kaj ne flankigante
ni iru la vojon celitan!
eĉ guto malgranda, konstante frapante
traboras la monton granitan.
—L' espero l' obstino kaj la pacienco—
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro
atingos la celon en gloro.
—Ni semas kaj semas, neniam lacigas
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,—
ni semas kaj semas konstante.
—«Ho ĉesu!», mokante la homoj admonas,—
«Ne ĉesu, Ne ĉesu!» en kor' al ni sonas:
«Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
se vi pacienco eltenos».
—Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
veikantaĵn foliojn deŝiras,
ni dankas la venton, kaj repurigataj
ni forton pli freŝan akiras.
—Ne mortos jam nia bravega anaro,
ĝin jam ne timigas la vento, nek staro
obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
al cel' unu fojon signita!
—Nur rekte kurage kaj ne flankigante
ni iru la vojon celitan!
eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.
—L' espero, l' obstino kaj la pacienco,—
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

L. ZAMENHOF

EL CAMÍ

—Tras densa foscuria llueix ja la meta
que ardis perseguim;
en nit tenebrosa, estrella fulgenta
que 'ns signa 'l camí.
—Ja no 'ns intimiden fantasmes nocturnes,
adversa fortuna ni estúpides burles,
puix clara, ben dreta i ben definida
se 'ns mostra la via escollida.
—De dret i amb coratge, sens mai desviar-nos,
seguim nostra via;
fins d'aigua la gota, forada, amb constancia,
la roca granítica.
—Perfidia, esperança i llarga paciència,
aitals són els medis per quina potencia
poquet a poquet i tras lluita penosa
podrem assolirla, la fita gloriosa.
—Sembrem incansables, en ores vinentes
la pensa fixada:
encara que s'perdin llavors a dotzenes,
seguim nostra tasca.
—«Pareu ja!» la turba nos crida burlona.
I, al punt, veu potent a dins nostre ressona:
«Avant, Avant sempre! Lluitant amb fermesa,
veureu beneïda pels nêts vostra empresa»
—Si llarga sequia, o bé 'l torb, arrenca
les fulles marcides,
lloem la tempesta que 'ns don fresca saba
i espurga les files.
—Es brau, nostre exercit! Ja res el detura:
ni 'l vent ni la calma li donen paŭra.
Valenta es sa marxa, provada, atrevida,
seguint, avant sempre, la via escollida.
—De dret i amb coratge, sens mai desviar-nos
seguim nostra via:
fins d'aigua la gota, forada, amb constancia,
la roca granítica.
—Perfidia, esperança i llarga paciència,
aitals són els signes per quina potencia
poquet a poquet i tras lluita penosa
podrem assolir-la, la meta gloriosa.

JAUME MUIXÍ, Sch. P.



BARCELONO.—Generala vidajo de la urbo.

LA MAGIA ĈEMIZO

La Reĝo estis malsana. Lia vango estis ruĝa, lia okulo klara kaj hela; li manĝis kaj trinkis kun reĝa avideco, kaj trankvile ronkadis ĉiunokte. Sed li diris, ke li estas malsana, kaj reĝo devus scii. La kuracistoj alvenis dudekope, sed ili ne resanigis lin.

Li detranĉis iliajn kapojn, kaj venigis al si pluajn el la lernejoj. Fine alvenis du famaj kuracistoj.

Unu el ili estis malriĉa kiel preĝeja muso. Li pasigis la tutan vivon je studa penegado, kaj neniam trovis la tempon por grasiĝi. La dua neniam malfermis libron. Liaj pacientoj ne ĝenis lin; se ili resaniĝis, ili pagis al li multe da mono; se ili mortis, la heredantoj pagis duoble. La du kuracistoj kune ekzamenis la reĝan langon, dum la altrangulo kuŝis sur sia kapo. Siavice ili ekbatis lian grandiozan bruston, sed neniam postsignon de malsano ili povis trovi. Fine la maljuna saĝulo diris: «Vi estas sana kiel nukso». «Pendigu lin!», blekegis furioze la Reĝo. Oni do pendigis lin tiel alten kiel Hamanon, kaj la alia kuracisto iom paliĝis.

Tamen li penseme frotis sian sagacan nazon, kaj jen lia eldiro: «La Reĝo resaniĝos se li dormos unu nokton en la ĉemizo de feliĉulo». Tra la tutan regnolandon rajdis la kurieroj, kaj rapide galopis liaj ĉevaloj. Multajn personojn ili vidis, kaj al multaj parolis, sed feliĉulon ili ne trovis.

Ili trovis malriĉulojn, kiuj deziras esti riĉaj, kaj riĉulojn, kiuj kredas sin malriĉaj. Ĉe la vojflanko, sidis du viroj: ĉiu plendis pri sia sorto. Unu bedaŭris, ke li enterigis sian edzinon; la alia ke li tion ne faris. Fine la senditoj alvenis al vilaĝa pordego. Almozulo, fajfante, tie kuŝis. Li fajfis kaj kantis, ridis kaj ruliĝis sur la herbo en la milda junia aero. La lacaj kurieroj haltis kaj rigardis la viraĉon tiel ĝojan kaj gajan: Unu el ili diris: «Dio benu vin! amiko, vi aspektas feliĉa hodiaŭ».

«Ho jes! miaj sinjoroj, la kanajlo ride diris, kaj lia voĉo aŭdigis libere kaj gaje, «mallaboremulo havas tiel multe por fari, ke li ne havas la tempon por esti malĝoja!» «Jen nia homo!», diris la kuriero, «mi donos al vi cent dukatojn, amiko mia, se vi hodiaŭ nokte pruntedonos al mi vian ĉemizon». La gajulo sterniĝis sur la herbo, kaj ridegis ĝis kiam lia vizaĝo nigriĝis. «Mi ja tion farus», li diris, eksplodigante pro ridado, «sed eĉ unu ĉemizon mi ne havas».

El la angla tradukis
LOUISE BRIGGS.

AMUZAĴO

Ĉe sovaĝaj bestoj:

La dresisto, — Tiu ĉi Bengala tigro bezonas por manĝi unu bovoviron.

Sinjorino al sia edzo:

—Zorgu, Venancio, ne alproksimigu tie!

VIAJ OKULOJ

De l'via vizaĝo
okuloj silentaj
ho, mia amatino!
parolas al mi.

Madrido

Ne fermu vi ilin
lasu ke mi vidu
ĉu ili mensogas
ĉu mensogas vi.

A. DE ORRIOLS.

LA KANTO DE L'ARBARO

Vi jam ofte min kortuŝis
De l'arbaro sankta kanto,
Kiam mi sur musko kuŝis
Kiel muta aŭskultanto.

Kiam la folioj bruis,
Ili eksonigis tian
Kanton belan, kiu fluis
En la lacan koron mian.

El Germanujo

Arbarkanto, — vi sanigas,
— Kiel dolĉa la balzamo, —
Ĉiujn vundojn, — vi plenigas
Mian koron je sant'amo.

De l'kantistoj granda reĝo,
Ĉesu kanti do neniam!
Vian kanton, dolĉa preĝo;
Vi daŭrigu ĉiom, ĉiam!

SCHWARTZ RAYMONDO.

ĈARMOJ DE LA MUZIKO

En la Kapelo de l'malfeliĉa reĝo el Franclando Ludoviko la XVI^a, oni kantis dum la ĵaŭdo de la sankta semajno, la *Miserere'on* de l'majstro Lully.

La reĝo restis genufleksita dum tiu daŭra ceremonio, kaj ĉiuj korteganoj, kompreneble, estis ankaŭ sampezaj.

La monarĥo, al kiu multe plaĉis la Lully'a muziko ĵus kiam finis la religia ceremonio demandis al grafo de Gramont, kiu staris tre proksime al li:

—Kia estas via opinio pri tiu muzikaĵo, grafo?

—Reĝa Moŝto, tiu repondis, por la aŭdoj bonega; sed por la genuoj, aŭ bo-
meninda.

Tradukis
P. AGUILÓ.

PENSQJ

1. Ami kaj esti amato, estas de du koroj la uniĝo: je tio ĉi jam ne irasu plu alten la homa feliĉo!

2. Kiu ne konas lingvon fremdan: tiu nenion povas scii nek pri la sia.

3. Unu la alian reciproke, la malfortan ni ĉiuj devas helpi: ĉi tio estas la leĝa vico de la naturo.

4. Unu bela virino al nia koro povas esti: anĝelo kaj diablo!

Tradukis ETEKKA SATOR; urba instruistino en Szabadk; (Hungarujo).

LUBECK.—Gvidlibro tra la Libera kaj Hanso-urbo kun karto de Lübeck, tradukita de la Lübecka Esperanto-Societo. Eldonita de la Unuiĝo por frenduloj en Lübeck. Oficejo: Am, Marck 15, Lübecko. Prezo: 0'200 Sm. (fr. 0'50).

Tiu-ĉi gvidlibro estas tre rekomendinda ĉar enhavas multajn informojn kaj belegajn ilustraĵojn.


**

LA HIMNO ESPERANTISTA.—De l'Majstro L. L. Zamenhof. Kantigis Wolfgang Schaumburg. Prezo: Mark 2, Schamburg-Fleischer's Verlag, Genevo.

**

TURISMO ĉe la fervojaro de Paris al Orleans. Tre luksa broŝuro kun kvar geografiaj kartoj, kaj multaj kolorigitaj ilustraĵoj.


La multnombraj informoj estas tre utilaj, kaj rekomendindaj por la voja ĝantoj.



AL NIAJ ABONANTOJ

La abono al nia gazeto finiĝas por la plimulto de abonantoj tiun ĉi monaton.

Insiste al ĉiuj ni petegas, ke ili ne forgesu reaboni TUTDONDA'N ESPERO'N, dum la venonta jaro kaj sendi samtempe la abonkoston al Sinjoro Administranto, kiel eble plej baldaŭ.



ESPERO KATALUNA

TALLERS, 81, ĈEFA ETAGŌ
BARCELONO

La plej malnova Esperantista Societo el Katalunlando

Biblioteko kun pli ol 400 volumoj

Ankaŭ pli ol 70 nunaj kaj diversaj gazetoj kaj revuoj Esperantistaj ĉiam legeblaj.

Senpagaj kursoj de Esperanto, klarigitaj de lertaj geesperantistoj.

Amuzaj "Verdaj Vendredoj" por praktiki Esperanton.

Ekskursoj, festenoj, k. c.

MONATA KOTIZAĴO 1 Peseto

(Eta go)

Etago

NOVEJARQUE

ESPERANTO GERMANA ESPERANTISTO

★ RESTORACIO ★

Strato Asalto, 54 - BARCELONO

Biero, vinoj, ĉampano, kaj ĉiuspecaj likvoroj. Esperanta manĝaĵo ĉiusemajne.

Esperantistoj! Veni tien-ĉi!

ONI PAROLAS ESPERANTE

Monata gazeto por la vastigado de la lingvo Esperanto
Monatsschrift für die Verbreitung der Esperantosprache

Tiu ĉi gazeto, unu el la plej malnovaj esperantaj ĵurnaloj, estas redaktata esperante kaj germane, kun ĉiam varia enhavo: originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj, propagando, kroniko, literaturo bibliografio, korespondoj, konkursoj, konsiloj por la praktika vivo, instruoj por lernantoj, oficialaj informoj ktp.

Jaro abonprezo 3 Mk. (1.50 Sm.) en ĉiuj landoj.
Prova abono per 6 monatoj 1.50 Mk. (0.75 Sm.)

Esperanto Verlag Müller & Borel, Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19

POLA ESPERANTISTO Franca Esperantisto

Monata organo de Polaj Esperantistaj Societoj

JARABONO | en Francujo, 3 fr.
| en Eŭropo 3-75 "

Administracio: Hoza, n.º 20, m. 8.

VARSOVIA


JARABONO, 5 FR.

G. Wagner & C.º

1, AVENUE DE SCEAUX, 1
VERSAILLES

MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAĜI

ONI VENDAS MALALTPREZE



Manuelo Balleŝpi

Strato Ample, 43-BARCELONA